# Novaj magistraj studoj por festi la 25-jariĝon de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj

*Intervjuo kun Ilona KOUTNY*

**IPR:** De tempo-al-tempo ni povas legi pri la progreso de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznano (Pollando). Nun ĝi jubileas sian 25-jariĝon. Ĉu vi, kiel iniciatinto kaj gvidanto de la studoj, povus koncize resumi tiun kvaronjarcenton?

**IK:** La tri-jaraj internaciaj studoj en Esperanto – unikaj en sia ĝenro – ofertas studobjektojn de **interlingvistiko en vasta senco**: internacian kaj interkulturan komunikadon, internaciajn etnajn kaj planitajn lingvojn (interlingvistiko en malvasta senco), koncentriĝas al la plej vaste uzata planlingvo Esperanto, pri ĝiaj lingvistika analizo, literaturo, movadhistorio kaj kulturo. Por doni bonan bazon por esperantologio ankaŭ lingvistikaj studobjektoj estas parto de la studprogramo. Tiel interesiĝantoj kun plej diversaj bazaj universitataj diplomoj kaj el diversaj mondopartoj povas partopreni en la studoj.

La specialiĝoj en la tria jaro ebligas enprofundiĝon en diversajn terenojn, el kiuj tre gravas la *instruista trejnado*, ja estas la sola universitata formado de E-instruistoj. Por tio IS de AMU kunlaboras kun ILEI kaj Edukado.net. Eblas aliĝi nur al tiu ĉi speciala jaro. La sekva ebleco estos en septembro 2023. La specialiĝo *internacia kaj interkultura komunikado* estas grava por montri la rolon de E-o en tiu ĉi tereno.

Nun studas la oka grupo: 21 partoprenantoj el 11 landoj, inter ili ankaŭ Azianoj (Ĉinio, Indonezio, Koreio kaj Vjetnamio) krom Eŭropanoj (Ĉeĥio, Francio, Granda-Britio, Kroatio, Pollando, Rumanio) kaj Sud-Amerikanoj (Brazilanoj). Entute preskaŭ 200 homoj komencis studi ekde 1998 el kiuj ĉ. unu triono finas la postulemajn studojn. Inter ili estas entuziasmaj junuloj kaj spertaj maturaj homoj, kiuj bone kompletigas unu la alian. La antaŭaj grupoj renkontiĝis unufoje ĉiusemestre, sed la nuna tekniko ebligas retajn renkontiĝojn, pli multajn kaj kun invititaj gastprelegantoj.

La **internaciecon** de la studoj certigas ankaŭ la instruistaro de IS. Estas grave doni eblecon al niaj konataj fakuloj (kiel John Wells, Humphrey Tonkin, Nicolau Dols … Vera Barandovska-Frank, Sabine Fiedler, Katalin Kováts) por gvidi kurson al la studentoj, ke tiuj havu freŝajn kaj aŭtentajn informojn pri diversaj terenoj de esperantologio/interlingvistiko.

**IPR:** Krom la ŝanĝoj por la aktuala postdiploma grupo okazis grava novaĵo: la startigo de magistraj studoj pri interlingvistiko en AMU. En kio ĝi estas speciala?

**IK**: El pluraj aspektoj la novaj **magistraj studoj** (specialiĝo kadre de la studdirekto lingvistiko kaj informmastrumado) diferencas de la post-diplomaj: ili daŭras du jarojn kaj surloke en Poznano, fine ili donas magistran titolon, sed ili same valoras 120 poentojn. Ili estas destinitaj unuavice por junuloj, kiuj volas magistriĝi. Alia grava afero estas la kombino de **interlingvistiko** (kies studobjektoj lingvistike estas orientitaj – en Esperanto) kun **informmastrumado** (kiel trovi kaj uzi lingvajn informojn el la reto – en la angla). La studentoj analizas lingvistikajn kategoriojn tra la Esperanta gramatiko, studas lingvotipologion, lingvopolitikon kaj interkulturan komunikadon. Kursoj pri Esperantaj literaturo, kulturo kaj movado lokas Esperanton en la mondan fluon. Lingvokursoj de Esperanto kaj la angla gvidas la studentojn al la plej alta nivelo, enprogramas ankaŭ kurso pri tradukado inter la du lingvoj.

La unua grupo startis en 2022 kun 10 ĉinaj studentoj, kiuj entuziasme kaj diligente laboras. Plejparto venas de la ĉina universitato Zaozhuang, kie ili studis Esperanton inter 2018 kaj 2022. La vicrektoro de AMU prof. Rafał Witkowski dekomence subtenis la novan projekton kaj akceptis la studentojn en la rektora salono kun donacoj [*vd. la foton sube*].



La studoj pretigas la studentojn ankaŭ por la ***labormerkato.*** Ja en internacia Esperanto-medio ili lernas kiel kunlabori en internacia grupo, alproprigas informadikajn metodojn kaj lernas lingvojn.

**Por la sekva jaro 2023/24 ni atendas studentojn el diversaj landoj**. Informoj pri tio alireblas en: https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/ kaj http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/blog.html#magistraj22

**IPR:** Ni aŭdis, ke aperis nova libro pri Esperanta kulturo en la serio de la Interlingvistikaj Studoj. Granda entrepreno, ĉu ne?

**IK:** Mi jam delonge planas eldoni **lernolibroserion por la Interlingvistikaj Studoj**, tio nun eĉ pli urĝas pro la tagaj studoj kaj ankaŭ la 25-jaraj spertoj devigas nin. La unua estis la lernolibro pri **Interlingvistiko** de Vera Barandovska-Frank en 2020, kiu dekomence gvidas la interlingvistikan kurson (planlingvistikon) kadre de la studoj, kun kontribuo de studentoj.

La nuna libro **Esperanta kulturo** (2022. red. Ilona Koutny. Poznań: Rys. p. 266) estas ĉapitraro verkita de instruistoj kaj studentoj de la Studoj. Post mia enkonduka artikolo pri Esperanta kulturo (trarigardo de la ĉiutaga kulturo ĝis arto, de ĝia lingva apero ĝis la socia engaĝiĝo kaj valoroj) ĝi gvidas la leganton tra la rilato inter kulturo, lingvo kaj lingvokomunumo per kontribuoj de Sabine Fiedler, Fabio Fortes, Ilona Koutny, Aleksandro Melnikov kaj Ida Stria.

Poste sekvas la prezento de diversaj kulturterenoj, komence kun diskutiga artikolo, ĉu Esperanto bezonas arton (Svorad Zavarský): pri teatro (François Lo Jacomo), gazetaro (Jukka Pietiläinen), Esperanto-radio (Barbara Pietrzak), televido (Miĥaelo Balicki), kino (Judit Schiller), Esperanto-muzeo en Zaozhuang (LI Xin) kaj scienco (José Antonio Vergara).

**IPR:** Vi parolis pri la jubileo de la Interlingvistikaj Studoj, sed ankaŭ vi jubileas persone, ĉu ne?

**IK:** Jes, mi esperantistiĝis antaŭ **50 jaroj,** kiam mi ekstudis Esperanton (1972) en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (ELTE) ĉe prof. István Szerdahelyi. Kaptis min la fleksebla strukturo de la lingvo, ĝia justa solvo de internacia komunikado, la ebleco science kunlabori kaj la bona etoso en la Esperanto-fako. Post jardeko da spertado en eldonado (ankaŭ ĉe la tiama Scienca Eldona Centro de UEA) kaj komputa lingvistiko (ekz. ĉe la Budapeŝta Teknika Universitato) mi iĝis lia posteulo post lia morto en 1987. La unuan internacian magistran studadon pri esperantologio ni fondis en

ELTE… Do sume mi dediĉis jam 10+25=35 jarojn al la universitata instruado de Esperanto.

**IPR:** Dankon pro la intervjuo kaj ni deziras al vi eĉ pli grandajn sukcesojn!

Pli detale pri la studoj kun bibliografio:
https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj/
Nova intervjuo pri tiu ĉi temo aperis en la pola retradio: https://pola-retradio.org/2023/01/e_elsendo-el-la-25-01-2023/.